KRISTNASKO EN ANGLIO

ALGERNON BLACKWOOD

ESPERANTO de REĜO

Ĉi tiu e-libro rezultas de multe da malfacila voluntula laboro. Ĝi konstruas sur la laboro de aliaj literaturaj enthusiasmuloj kaj nur estas ebla ĉar la publika havaĵo. La originala teksto kaj artaĵo en ĉi tiu e-libro estas kredatej en la usona publika havaĵo; t.e. ili estas kredatej senkopirajtoj limigoj en Usono. Eble ili estas kopirajta en aliaj landoj, tial legantoj en aliaj landoj kontrolu sian leĝoj antaŭe uzanti ĉi tiu e-libro. Ĉi tiu e-libro estas donata al la tutmonda publika havaĵo per la kondiĉoj en la CC0 1.0 Universala Publika Havaĵo Dediĉo. Vi povas legi tutan avizo en la Ne-Kopirajto kaj lerni pri la subesta verkoj en la Kolofono.

Kristnasko en Anglio

En lastatempa jaroj, kiam estis apenaŭ sufiĉe da neĝo sur la tero je la tempo de Kristnasko por doni al la lando eĉ sezonan aspekton, ŝajnis preskaŭ moko daŭre festi la samajn malnovajn kutimojn kaj plenumi la samajn ceremoniojn, kiuj estas ligitaj de tempo nememorebla en la menso de la angla popolo kun vintra ĉielo kaj pejzaĝo, kiuj, en la tempo de niaj prapatroj, tiom malofte forestis en ĉi tiu sezono de la jaro. Malgraŭ kiel tiu estu, la kutimoj ĉiam asociitaj kun malmoderna Kristnaska-julatempo ankoraŭ estas tre praktikataj; la amasigitaj lignofajroj ankoraŭ kraketas kaj brulas same hele kiel ĉiam en la ampleksaj malnovaj kradoj, kaj la dike-kruraj kverkaj tabloj ankoraŭ subtenas kiel delikatan rostitan bovaĵon kaj same bongustan kaj nedigesteblan prunpudingon kiel ili iam faris en pratagojn.



La Domego

En Anglio Kristnasko estas universala ferio. En la urboj la bankoj estas fermitaj; oficejoj estas dezerta. La vendejoj en la urbetoj kaj vilaĝoj estas ĉiuj fermitaj, kaj kvankam la mateno de Kristnaskatago estas ĉiurilate traktata kiel dimanĉo, la posta parto de la tago estas fordonita al kiaj ajn eksteraj amuzaĵoj la stato de la vetero eble igas taŭgan; la vespero vidas la asembleon de ĝojaj festoj kaj amikaj renkontiĝoj, iuj daŭras ĝis la etaj horoj de la mateno, kaj estas antaŭĝojataj de la pli juna parto de la komunumo kun entuziasmo kiun la pasantaj jaroj tendencas plialtigi prefere ol malpliigi.

Sed por vidi Kristnaskon kiel ĝi estas vere konservita de la homoj,

ni devas forlasi la urbojn kaj plonĝi profunde en la koron de la kamparo; ni devas intermiksiĝi kun la homamaso, kiu en la festa sezono eniras la pordegojn de la gastama domego de la varleto, aŭ en la longaj malaltaj ĉambroj de la malnovaj farmdomoj. La vera komenco de la festoj estas la Kristnaska-vespero, kiam la grandaj grupoj renkontas siajn amikojn de malproksime kaj proksime ĉirkaŭ la festa festenotablo. Tiam la tempo pasas ĝuste gaje.

La vilaĝa gastejo reprezentita en la malsupra skizo, sendante sian ruĝecan brilon tra siaj kradaj fenestroj, trans la neĝon, kaj kun sia bene-konata signo—diru la “Ruĝa Leono”—pendante super la pordo, rikoltos konsiderindan rikolton; kaj gaja kunveno de grandostaj laboristoj kaj harditaj kamparanoj, kun la gastiganto mem, korpulenta kaj ruĝeca, meze, igos la nigritajn ĉevronojn sonori denove per kanto kaj ŝerco dum la nokto iras. Tie ni aŭdos multajn strangajn fantazio aŭ kuriozajn superstiĉojn, kiujn la sezono de la julŝtipo kaj la ileksa bero denove estigas al iliaj memoroj. Dum ili sidas kaj parolas super siaj trinkpotoj, ili tre malmulte zorgas pri io ajn alia krom la fakto ke "La bona malnova Kristnaska-julatempo" revenis. Malmulte gravas al ili, ke la efektiva Kristnaska tago eĉ ne estis fiksita je la 25-an de decembro ĝis la kvara jarcento. Ili estas pretaj festi la tagon kiel ĝi estas, kaj esti gajaj, kio ajn okazos.



Kiel antaŭe aludis, superstiĉo de la plej absurda speco ĉie tre abundas en ĉi tiu sezono, kaj malmultaj personoj kiuj ne pasigis Kristnaskon inter la homoj en la kamparaj vilaĝoj povas havi ia ideon pri kiom ĝi regas. En lia *Angla Kamparvivo*, Tomaso Milero rakontas al ni, kiel li faris la malkontenton de parenco malobeante regulon, kiun certa superstiĉo faris necesa. Li diras: “Doni al homo lumon inter Kristnasko kaj la Dekdua Nokto estas porti al vin mem malbonŝancon dum tiu tuta jaro. Mi bone memoras, ke mi perdis la bonvolon de mia maljuna avino per permesante mallumita ĉaristo ekbruligi sian lanternon dum ŝia dorso estis turnita, kaj pasis multe da semajno antaŭ ol la maljunulino pardonis min.”

Kristnaska-mateno en la Domego

En la malnovaj tagoj niaj prauloj kutimis daŭrigi la gajan sezonon en preskaŭ la sama maniero, sed dum la Mezepoko regis kutimo, kiu de tiam perdis sian karakteron, se ĝi ne tute formortis. Tiel, en la pli grandaj urboj estis prezentitaj certaj misteroj—dramaj reprezentadoj—en kiuj la ludantoj portis groteskajn robojn kaj maskojn. Tiuj ĉi estis festitaj kun granda pompo kaj ceremonio, kaj

la kamparanoj amasiĝis de malproksime kaj proksime por vidi ilin. La nura kutimo, kiu montras iom ajn da similo al ĉi tiuj, kaj kiu troviĝas nur nun en certaj partoj de la mezlandaj konteoj, estas nomita la “Decembraj Liberecoj,” aŭ la festo de malsaĝuloj kaj azenoj, kiu estas priskribita kiel “groteska saturnalio, en kiu ĉio grava estis ridindigita.” Tutaj vilaĝoj elirus por danci, portante torĉojn kaj ĉiamverdojn, ĵetante strangajn ombrojn sur la briletantan neĝon.

Tra pordoj la domoj je la tempo de Kristnasko estas tre gajaj kaj helaj. Sur la larĝa ŝtona kameno julŝtipo brulas, vigle ĵetante ruĝecan brilon sur ĉion ĉirkaŭe, dum la muroj kaj bildoj estas ornamitaj per ilekso, hedero kaj pluraj aroj da visko penditaj supre en evidentaj lokoj pro same evidentaj kialoj. Ĉi tiuj ornamadoj estas kutime konservitaj ĝis Dekdua Nokto aŭ malnova Kristnaska-tago. Ankaŭe en ĉi tiu sezono, estas planto nomata rosmareno, kiu floras ĉirkaŭ la tempo de Kristnasko. Ĝi estis teninta en alta reputacio de niaj prauloj, kvankam la celoj pri ili uzis nun estas ĉesinta rimarki. Ili okazigis altan ferion de Kristnasko-tago ĝis Kandelfesto (2-a de februaro), kaj ilia unua festeno estis la okazo por alporti la kapon de la sovaĝa apro,

"Sur arĝenta plado kun menestrelaĵo."

Tiam, post kiam la grandaj trinkpotoj estis plenigitaj, estis la kutimo kirli la ŝaŭmantajn potojn per branĉetoj da rosmareno. Ĝi estis ankaŭ konsiderata aŭspicia uzi ĝin en du aliaj okazoj de tre kontraŭa naturo, nome, geedziĝo kaj entombigo. Branĉoj de la planto estis portitaj antaŭ la novedzino aŭ almetitaj sur la tombon, kiel la okazo postulis, kaj rilatante al tiu malnova kutimo en siaj *Hesperidoj*, Herrick diras ke la rosmarenplanto

“Kreskas por du celoj; nesignifas ĉu

Por mia nupto aŭ por tombo estus."

Nur estas ĝuste, ke preĝejoj, kiuj estis konstruitaj al la honoro de Tiu, kies naskiĝon ni festas dum ĉi tiu sezono, estu tiel hele ornamitaj kiel ili estas; kaj en la kamparpreĝejeto certe estos plena kirkanaro, de la varleto, kiu ne tiom regulas en sia ĉeesto, eble, kiel li povus esti, dum la jaro, ĝis la plej maljuna kamparano, kiu elterigas el sia jarlonga tombo antikva kastora ĉapelo, el kiu la silka

poluro jam delonge fuĝis, kaj kiun li surmetas honore al la tago.



Oksfordo ka Sia Kolegioj

Se ĝi falus iam al la sorto de fremdulo ke esti promenanta tra la kamparaj vojetoj proksime de noktomezo je Kristnaska-vespero, li estos ektimigi aŭdi, je la lasta sonoro de la dekdua, la fera-klang de la preĝejaj sonoriloj malproksima kaj proksima elsonorigus la plej bonan sonorojn kiuj ili kapablas, kaj el Terfino (Land's End) al Johano de Kvarpencoj (John o' Groats) neniu preĝeja turo kiu

posedas sonorilojn estus silentanta. Kiam tiuj ĉesas la karolisaroj komencas siajn rondojn, kaj irante de domo al domo, kaj vilaĝo al vilaĝo, ili kantas karolojn kaj Kristnaskajn himnojn ĝis la lumo komencas brileti en la orienta ĉielo kaj alia Kristnaska-tago estis tagiĝanta.

La kutimo pri kanti karolojn je la tempo de Kristnasko povas spuri malantaŭen multaj longaj jarcentoj. En la klasika urbo Oksfordo, la fortikaĵo de antikvaj kutimoj kaj antikvaj opinioj, Kristnasko estis festita dum jarcentoj kun kiom multe de la pompo kaj spektaklo de la Mezepoko. La procesiokanto de la Kapo de Apro, la "Ni-ĉiuj Ĝoju", la kantado de la koruso portanta surplisoj en la la kapelo de kolegio (kiel montrite en nia frontispico), estas daŭre celebritaj kiel en apenaŭ iu alia loko. Kaj en la Biblioteko de Bodlej ankoraŭ povas esti vidita unu el la plej malnovaj kolektoj de karoloj konataj ekzisti. La volumo, de kiu restas nur kelkaj paĝoj, estis presita en la jaro 1521, fare de Wynkin de Worde, kaj estas titolita Chrismasse Carolles. Ial Oksfordo estas precipe favora al la laŭro, kaj kiel dekoracia ĉiamverda en la kapeloj de la malsamaj kolegioj, ĝi kutimas la tuta delokiĝo de ilekso aŭ hedero.

Estas multaj aliaj kutimoj en la grandaj urboj, kaj malmoderna tradicioj en la lando, ankoraŭ konservitaj en multaj partoj de Anglio, kiujn limon de spaco malpermesas al ni mencii; kaj kvankam iuj el tiuj eble jam formortis kaj aliaj nun iom post iom formortas dum la jaroj ruliĝi plu, ni estas certaj pri unu afero, nome, ke Anglujo ĉiam estos la hejmo de Kristnaskaj kunvenoj kaj jubiloj iaspecaj; kaj se la malnova-tempa amuzaĵoj kaj kuriozaj malnovaj ceremonioj cedas al aliaj alispecaj, ni esperu, ke la angla popolo ĉiam danke memoros, en siaj gajeco kaj Kristnaskaj festoj, la okazon, kiam Li kiu ebligis tian feliĉon, kaj kiu faris nin, kiel nacio, kio ni estas, naskiĝis en stalo kaj lulita en staltrogo.

Sonu super ĉiuj akvoj, etendiĝu el ĉiuj teroj,

La Ĥoro de voĉoj, la kunpremo de manoj,

Kantu himnojn, kantitaj de steloj matena,

Kantu kantojn de anĝeloj kiam Jesuo naskiĝina!

—Vitiero.

ESPERANTO de REĜO

“Christmas in England” estas verkinta de
ALGERNON BLACKWOOD
kaj eldonita en 1890 inter la enhavo de *La Metodista Revuo*.

La ciferaca skano povas troviĝi ĉe la
GOOGLE BOOKS.

Ĝi transkritis de PAUL KING. La transkripto troviĝi ĉe
GITHUB

Ĝi tradukitis el la Angla al Esperanto en 2023 kiel “Kristnasko en Anglio” de
PAUL KING.

Ĉi tiu e-libro kreaĵiĝis uzante iloj kaj formatoj de
STANDARD EBOOKS.

Ĉi tiu e-libro kreaĵiĝis en 2023 de
PAUL KING.

La kovra paĝo adaptiĝis el *The Christmas Anthem* de
G. P. JACOMB-HOOD.

La kovra-paĝo kaj titola-paĝo uzas la
LEAGUE SPARTAN kaj SORTS MILL GOUDY
tiparoj farita en 2014 kaj 2009 de
THE LEAGUE OF MOVEABLE TYPE.

La unua eldono de ĉi tiu e-libro estis publikigita je
La 21-an de decembro 2023, 17:00 p.m.

Ne-Kopirajto

Faru bonon anstataŭ malbonon; pardonu aliajn kiel vi mem estas pardonita; kaj kunhavigu senavare, donante ne malpli tiom ke vi prenas.

Malsame de kutima kopirajta paĝoj, kiuj diras la legantan kio si ne povas fari, ĉi tiu ĉi tiu nekopirajta paĝo estas ĉi tie por diri vin ke kaj la teksto kaj la artaĵo en ĉi tiu e-libro estas kredatej en la usona publika havaĵo; t.e. ili estas kredatej senkopirajtaj limigoj en Usono. La publika havaĵo estas la hejmo del nia kolektiva kultura heredajo. Tio, kio estas en la usona publika havaĵo estas libera por uzo de iu en Usono por preskaŭ ĉio, sen bezono de permeso.

Landoj havas siajn proprajn kopirajtajn leĝojn kaj la enhavoj de ĉi tiu e-libro eble estas akoraŭ sub limiĝo de kopirajto en via lando. Tial, se vi ne estas en Usono, konu la leĝojn en via lando antaŭ uzi ĉi tiu e-libron.

Oni ne estas eble kreati nova kopirajto per, exemple cifereca skanadi, formati, aŭ tipografi. Sed, oni ja estas eble kreati kopirajto per traduko. Nekonsiderente, ĉi tiu tuta e-libro estas donata por la tutmonda publika havaĵo sub la reguloj de la CC0 1.0 Universala Publika Domajna Dediĉo. Ĉi tiu deklaro ne efektigas ajn subestajn verkojn. La spirito de la intenco estas el frateco, boneco, kaj kultura riĉigo.